

KARAJ gepatroj kaj infanoj aliĝintaj al infankongreseto **IIK 2016** !

Bonvolu

++ konfirmi ricevon de tiu ĉi IIK-komuniko al infana.kongreseto@gmail.com

++ legi la tutan tekston detale kaj eble reagi,

++ printi tiun ĉi paĝon kun ĉiuj haveblaj informoj kaj kunporti ĝin al UK.

ADRESO de IIK-ejo: Stredná odborná škola veterinárna, Dražovská 8/14, 949 01 Nitra-Zobor
(Ni ne scias, ĉu ĝia oficiala numero +421-37-7922002 estos uzebla dum nia restado)

TELEFONA KONTAKTO nur se gravaĵo, provu unue SMS-mesaĝeton:
hungara numero +36-20-270 6786 de s-ino Veronika Acsádi, parolas hungare.
franca numero +33-651242423 de s-ro Bert Schumann, parolas france, germane.
franca numero +33-686361311 de s-ino Annie Grente, parolas france, angle.

SABATA ALVENO: Infanoj kun siaj valizoj kaj gepatroj alvenu sabaton, la 23-an de julio en UK-kongresejo. Ĉe giĉeto per kongreskarto ricevu vian kongresan materialon kun UK-ŝildo. Infanoj povas kolektiĝi kun siaj valizoj ekde la 12-a horo en la salono "A03 - Zvara" (ĝi troviĝas teretaĝe, funde de la enirhalo sur la dekstra koridoro. Ĝi estas la dua salono en la maldekstra flanko en tiu koridoro.) Ĉiuj kune veturos per ĉ. la 17h30 aŭ 18h30 per buso aŭ aŭtoj al la IIK-ejo.

MERKREDA EKSKURSO: Merkredon, la 27-an de julio, IIK ekskursas al difinota loko. Nia buso ekiras de IIK-ejo eble post matenmanĝo kaj revenas eble antaŭ vespermanĝo. Se vi deziras veturi kun ni, retmesaĝu

SABATA REVENO: Ĉiuj infanoj revenos per buso al UK-ejo sabaton, la 30-an de julio, ĉirkaŭ 11h. Fine de la Solena Fermo en salono Zamenhof, ili kantos antaŭ ĉiuj UK-anoj. Post la fino, ĉiuj gepatroj konfirmu al Bert Schumann antaŭ repreni siajn infanojn. Informu se vi bezonas pli frue foriri.

AŬTOMOBILA VENO al IIK-ejo: De UK-ejo veturu norden per ĉefa strato 64 je direkto Bratislava, poste sur 64 je direkto Prievidza Topol'čany, tuj dekstren al VW, post 200 m vi staras antaŭ la IIK-ejo. Tuta vojo 4,5 km, 6 minutoj. [Vidu itineron.](#)

PUBLIKA TRANSPORTO al IIK-ejo: Per ĉiuhora urba buso linio 2 dum 15 min. [Legu detale.](#)

INFANOJ NEPRE KUNPORTU TION:

- **san-** kaj **vakcinad-**kajeroj, san-asekura karto/formularo aŭ ties kopioj, kiujn la infano konservu.
- medikamentoj kun uzinstrukcio, se necesas. Tiukaze informu nin.
- kremo kontraŭ sunbruliĝo kaj kuloj, ĉapo kaj okulvitroj kontraŭ forta sunlumo.
- pluv-vesto kaj taŭgaj ŝuoj por migri al la apuda monto Zobor
- sapo, dento-pasto+broso, mantuko
- banvesto, bantuko, eble bansandaloj por eniri akvon
- dorsosaketo por porti piknikon, akvobotelon dum ekskurso
- UK-kongreskarto, se vi ricevis, per ĝi prenu la kongresajn materialojn en UK-ejo.

INFANOJ LAŬBLE KUNPORTU TION:

- societaj tablo-ludoj, aliaj ludiloj, pilko, rakedo, volanludo ktp.

- rakedo kaj pilko de tablotenis (tablo estas en IIK-ejo)
- ŝatata muziko sur KompaktDisko aŭ USB-memorilo por **diskoteko**.
- tondilo, gluo, kraĵoj kaj papero restaj el lerneja jaro por desegni kaj skribi.
- fotilon (se elektronika fotilo, kunportu ŝargilon kaj USB-kablon)
- foto- aŭ film-prezento pri via urbo sur KompaktDisko aŭ USB-memorilo, ni havos projekciilon kaj komputilon por montri sur muro. Informu nin.
- notu la nomon sur ĉiuj vestoj se la infano emas forgesi vestaĵojn.

INFANOJ NE KUNPORTU TION:

- valoraj objektoj (perdo kaj ŝtelo ĉiam eblas, kvankam gvidantoj atentas)
- elektronikaj ludiloj (tiuj kreas ĵaluzon kaj malhelpas kuran aktivadon)
- multa poŝmono (ni kutime ne estos en lokoj, kie eblas aĉeti)

SANO:

++ Kaze de akcidento aŭ sanproblemo, ni konsultos kuraciston aŭ hospitalon, kiu decidus pri necesa traktado. Per transdono de viaj infanoj al IIK, implicite vi konsentas pri tiu maniero kaj vi engaĝiĝas repagi eventualajn kostojn. Ni provos kontakti vin kaze de gravaĵo.

++ La infano kunportas **vaksin-kajer**on aŭ ĝian kopion. Bonvolu informi, se via infano ne ricevis la bazajn vakcinojn (difterio, tetanoso, poliomjelito, tuberkulozo) kaj klarigi la kaŭzojn.

++ Ni iros bani kaj naĝi en urba naĝejo. Tiam la infanoj restos sub kontrolo de plenkreskuloj kaj savnaĝisto. Bv. informi, se via infano ne konas aŭ ne respektas la limojn de sia kapablo naĝi, plongi, subakviĝi. Bv. informi, se via infano ne rajtas naĝi.

++ Informu viajn infanojn pri iksodoj, petu ilin averti gvidantojn kaze de haŭta inflamo. Ni havos specialan kroĉilon por turne eltiri iksodon. Legu en otom.com. Post inflamo observu dum 3 semajnoj. Kaze de ia ruĝa inflama ringo konsultu kuraciston.

ALIĜINTOJ:

12 knabinoj de 4 ĝis 16 jaroj

10 knaboj de 7 ĝis 15 jaroj

10 plenkreskuloj de 40 ĝis 64 jaroj

12 loĝlandoj: belga, ĉina, finna, franca, germana, hungara, kataluna, korea, kroata, litova, pola, rumana, slovaka.

Vidu la [infanojn](#) kaj [plenkreskulojn](#).

Ĝis baldaŭ un UK kaj IIK !

Kore salutas Veronika por la IIK-teamo